

# Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno • Bimonthly bulletin 2010:2 (mar-apr)



Christopher ZERVIC

## ***Growing up with Esperanto*** (p. 14)

**Ankaŭ ĉi-numere:** Ĉu partopreni en la 95a UK? • *The Ilya Frank method* • Rakonto: *Metamorfozoj*  
Tradukaĵo-interŝanĝo: verkoj el la hebrea kaj rusa lingvoj • *Korelativa krizo* en flughaveno • kaj eĉ pli...

# Usona Esperantisto

**Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin**

**Vol 49, No 2 — 2010:2 (mar-apr)**

**Redaktisto • Editor:** HOSS FIROOZNIJA

**Sendu kontribuojn al • Send contributions to:**

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

*Usona Esperantisto is the newsletter of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, a photo of your face, and your email/postal address. With photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.*

*You may reprint content from this publication if you give credit. Please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed in this publication are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.*

*Usona Esperantisto estas la bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, vizaĝofoton kaj (ret)poŝtadreson. Kun fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, la loko, kaj la nomoj de la foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.*

Oni rajtas reaperigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi al la supra adreso ekzemplerojn de ajna republikigitaj materialoj. Opinioj esprimitaj en la bulteno apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ de la redaktisto.



**esperanto  
usa**

**Centra Oficejo • Central Office**

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

**Direktoro • Direktoro, CO:** William B. HARRIS

**Prezidanto • President:** Philip G. DORCAS

**Vicprezidanto • Vice President:** Tim WESTOVER

**Sekretario • Secretary:** Julie SPICKLER

**Kasisto • Treasurer:** ???

**Aliaj estraranoj • Other board members:** Jenja AMIS,  
Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, ROS Haruo,  
Tor KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie WINBERG,  
Christopher ZERVIC

## Noto de la prezidanto

Saluton, gekolegoj! Mi esperas, ke vi partoprenos nian Landan Kongreson en Vaŝingtono (28–31 majo). Pri la venontaj landaj kongresoj, la estraro atendas proponojn el Sanfrancisko por 2011 kaj el Dalaso por 2012. La Sanfranciska Esperanta Regiona Organizo (SFERO), kaj la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso (EKNT) pridiskutas interne pri la planoj por tiuj jaroj.

Mi petas, ke vi anoncu en viaj kluboj pri la gravaj eventoj en Esperantujo – do landaj kongresoj, NASK, UK, regionaj kunvenoj, ktp. Vidu la anoncojn kaj kalendaron en la bulteno kaj ĉe nia retejo por detaloj.

La Kandidatiga Komitato laboras nun pri listo por la venonta balotilo. Estras la komitaton Jakobo SCHWARTZ. Kun li kunlaboras Darcy ROSS, Lusi HARMON, Phil BREWER, kaj Peggy DOLTER. Dankon al la komitato. Membroj ricevos la balotilojn antaŭ la kongreso, laŭ la reguloj en nia statuto.

Jam pasis du monatoj de la nova jaro. Ĉu vi jam remembris al Esperanto-USA? Ĉu vi jam mendis gazetojn? Ĉu vi jam remembris al UEA por 2010? Vi povas membris al Esperanto-USA en nia retpaĝo. La kvanto da membroj estas nia ĉefa mezurilo de nia aktiveco kaj kresko. Mi petas, ke vi membris. Plue, anoncu tion en via loka klubo.

Se vi havas raporton el via loka grupo, nepre sendu tion al nia redaktisto por vastigi nian informon en la bulteno. Kontaktu al <bulteno@esperanto-usa.org> por informo pri fotoj kaj aliaj detaloj.

Mi vidos vin en Vaŝingtono!

Amike kaj kunlabore,

—Filipo DORCAS <filipo@grupoj.org>

**We need you!** Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_

City & State: \_\_\_\_\_

Postal code & Country: \_\_\_\_\_

Phone & Fax: \_\_\_\_\_

E-mail: \_\_\_\_\_

Birthdate (M/D/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_/\_\_\_\_ Ham radio call: \_\_\_\_\_

In the member list, don't publish my:  address  phone  fax  email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto ..... \$10.00  
*(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)*
- Youth *(you must be under 27)* ..... \$20.00
- Limited Income ..... \$20.00
- Individual ..... \$40.00
- Family ..... \$60.00
- Sustaining ..... \$80.00
- Life *(birthdate required)* ..... \$800.00

Credit card info:  Visa  Mastercard

Number: \_\_\_\_\_ Expires(M/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_

## Regional events

*These are just a small sampling of some of the upcoming events either conducted in or relating to Esperanto. For a much more comprehensive list of various events taking place around the world, see <<http://eventoj.hu/2010.htm>>. If you'd like us to list your regional event, please contact us at <[bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)>.*

### 3 – 4 April (Phoenix, AZ)

#### **Verda Domo de Arizono**

Spring gathering at the *Verda Domo de Arizono*. Ideal for families. For details, see <<http://verdadomo0.tripod.com>> or contact Angelina Taremi at <[angelinata@aol.com](mailto:angelinata@aol.com)>.

### 22 – 24 May (Trois-Rivières, QC)

#### **MeKaRo: Mez-Kanada Renkontiĝo**

The 7th annual *Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto* (MeKaRo) meets in Québec. Visit <<http://www.esperanto.qc.ca>>, email <[informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)> or write to Esperanto-Societo Kebekia, 6358-A, rue de Bordeaux, Montréal (Québec) H2G 2R8, Canada.

### 28 – 31 May (Washington, DC)

#### **Landa Kongreso de Esperanto-USA**

The national conference for American Esperanto speakers. A weekend of talks, courses, trips to sites in DC, and much more. Don't miss it! For more information, see <<http://esperanto-usa.org/node/1810>>.

### 28 June – 16 July (San Diego, CA)

#### **NASK: Nord-Amerika Somera Kursaro**

The world-famous North American Summer Esperanto Institute (NASK) meets for three weeks at UC San Diego. Study Esperanto by the beach and get five college credits from the University of California! Space is limited, so please sign up soon. For more info, see <<http://esperanto.org/nask>>.

## Local group meetings

*Local groups provide great opportunities for both experienced speakers and new students. Most groups meet monthly, weekly or even bi-weekly. The following is a list of contacts for some of the larger groups that meet regularly; for a more complete list, please see our website.*

### California

**Sacramento:** <http://esperanto.org/us/esos>

**San Diego:** <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

**San Francisco:** <http://esperanto.org/us/SFERO>

**Santa Barbara:** [dorothyh@west.net](mailto:dorothyh@west.net)

**Los Angeles:** <http://fizzylogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

**Colorado** (Longmont) <http://ek-ek.org>

**Connecticut** (Wallingford) <http://esne.net>

**District of Columbia** <http://esperantodc.org>

**Georgia** (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

**Hawaii** (Honolulu) <http://esperanto.org/us/Honolulu>

**Idaho** (Boise) <http://terpomuloj.org>

### Illinois

**Champaign-Urbana:** <http://ekoci.org>

**Chicago:** <http://esperanto-chicago.org>

**Maine** (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

**Massachusetts** (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

**Missouri** (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

**New Jersey** (Princeton)  
<http://esperanto-nj.tripod.com>

### New York

**New York:** <http://esperanto-nyc.org>

**Rochester:** <http://esperanto.lodestone.org>

**Ohio** (Cincinnati) <http://ligileto.freeshell.org>

### Texas

**Austin:** <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

**Dallas:** <http://esperanto-tx.org>

**Virginia** (Hampton Roads) <http://bonege.com>

**Washington** (Seattle) <http://seattlesesperanto.org>

**Wisconsin** (Madison) <http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

## Venu al MeKaRo en Tririvero!



La oka Mez-Kanada renkontiĝo en Esperanto (MeKaRo) okazos en Tririvero, Kebekio, de la 22a ĝis la 24a de majo. Tririvero estas agrabla urbo borde de la riverego Sankta Laŭrenco. Ĉiuj eventoj okazos en la ĉirkaŭaĵo de la kunvenejo (la Domo Hertel), historia konstruaĵo en la malnova urbo.

Oni povos tranokti ĉe diversaj gastejoj, junula gastejo aŭ hotelo. Vi devos mem mendi vian tranoktadon; informoj troviĝas ĉe la retejo sube.

La programo inkluzivas ekskursojn (al muzeo pri popolkulturoj, al malnova malliberejo, ktp), prezentojn, kulturen vesperon, kaj vespermanĝo en historia restoracio. La Esperanto-grupeto de Tririvero estas tre entuziasma bonvenigi vin. Vidu detalojn ĉe <<http://esperanto.qc.ca/eo/mekaro8>>.

La programo inkluzivas ekskursojn (al muzeo pri popolkulturoj, al malnova malliberejo, ktp), prezentojn, kulturen vesperon, kaj vespermanĝo en historia restoracio. La Esperanto-grupeto de Tririvero estas tre entuziasma bonvenigi vin. Vidu detalojn ĉe <<http://esperanto.qc.ca/eo/mekaro8>>.

## Deklamu poezion ĉe la LK

D-ro Esther SCHOR invitas vin partopreni en poezio-deklamado dum la LK en Vaŝingtono. Bonvolu retpoŝti al ŝi, antaŭ la 1a de majo, aŭ a) poemon originale verkitan en Esperanto, kiun vi ŝatas, aŭ b) usonan poemon tradukitan en Esperanton. Ŝi kompilos antologion kaj partoprenantoj laŭvice laŭtleĝos la poemojn. Eĉ se vi volas nur legi, bonvolu kontakti ŝin per <[eschor@princeton.edu](mailto:eschor@princeton.edu)>.

## NOREK okazos en Anacortes

NOREK (kunsido de esperantistoj el nordokcidenta Usono kaj okcidenta Kanado) okazos ĉi-jare en Anacortes, Vaŝingtonio de la 17a de septembro (vendredo) ĝis la 19a (dimanĉo). La ĉefa evento estos tuttaga pramŝipa vojaĝo al kelkaj insuloj en la bela insularo San Juan. Ĉiuj estas bonvenaj! Vizitu la NOREK-retejon ĉe <<http://sites.google.com/site/norek2010>> aŭ retpoŝtu al <[norek2010@gmail.com](mailto:norek2010@gmail.com)>.

## Korespondi deziras

### Vitalija GELUCEVIČIENĖ, Naujoj – 20 Daugai, Lithuania – Litovujo

Mi estas medicina fratino el Litovujo, kun tri infanoj kaj edzo. Mi ŝatas vojaĝi, turismon, sporton, naturon, ankaŭ danci kaj legi. Mi volas korespondi kun esperantistoj el Usono.

### Wieslaw MICHALAK, <[wiesmich@poczta.fm](mailto:wiesmich@poczta.fm)>

Mi estas polo kiu laboras en universitato kiel instruisto kaj filmisto. Mia hobbio estas velnavigado. Mi volas ekkoni aŭ filmiston aŭ veladiston por interŝanĝi profesiajn spertojn kaj praktiki la anglan lingvon.

### Koresponda Servo de JEI, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, Japan / Japanujo

La Japana Esperanto-Instituto (JEI) peras korespondon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron.

## Limeriko-rubriko

*La solvoj por la lastnumeraj enigmoj fare de Russ WILLIAMS estas la hollywoodaj klasikajoj (1) "Casablanca" kaj (2) "It's a Wonderful Life". Jen alia enigmo de li; denove ĝi aludas al klasika usona filmo. Ĉu vi povas diveni la nomon?*

Virino en sudo prestiĝis,  
kaj viro en ŝin enamiĝis.  
Sufero milita  
kaj amo finita.  
"Verdire, ne gravas al mi! Ĝis."

*(La solvo aperos en la venonta numero...)*

## Get fed for promoting Esperanto!

Rotary clubs meet every week, so they need many speakers. From 1988 to 1990 I gave over 100 talks about Esperanto to the Rotary club. The members had the most fun at their meetings and I felt welcome at them all. Speakers are treated to a free breakfast, lunch or dinner, depending upon the meeting time.

Now that my *denaska esperantistino* is grown, I've returned to more public speaking and spoken to several Rotary clubs. Aminda and I have created a wonderful brochure to involve and educate our audiences.

Rotary has special interest groups (Rotary Fellowships) reaching across the globe. Created in 1928, the Esperanto Rotary Fellowship was the first, and it is still very active. Ursula and Giuseppe Grattapaglia of Brazil staff its booth at the annual Rotary International convention. They were also guest speakers at the *Landa Kongreso* of Esperanto-USA in Texas, and they made Ron Glossop an honorary Rotarian for his work promoting peace and Esperanto. Both Ron and Neil Blonstein have helped at the booth.

The rotary web site at <http://rotary.org> lists the wonderful things that Rotary is doing (for example, it has almost eradicated polio worldwide). Click on "Club Locator" to find a group near you.

Women first became full Rotarians in 1989, and they participate as much as the men. Last fall I officially became a Rotarian for the fun of it. Some of you may also want to join for the contacts and to be an Esperanto presence.

Email me for the brochure and the outline I use for my presentation. Ankaŭ plaĉus al mi kunparoli kun vi pri tio.

—Sherry A. Wells

[esperantosherry@tm.net](mailto:esperantosherry@tm.net)

## Se ne UK... kial ne AK?

Ĉar usonanoj oficiale ne rajtas partopreni en la ĉi-jara UK, eble indas pripensi vojaĝon al la 6a Azia Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Mongolujo je 19–23 junio en Ulanbatoro.

Mongolujo estas sufiĉe ekzotika lando por usonanoj, kaj tiu ĉi estas la unua fojo en la historio de Esperanto-movado ke tie okazas internacia Esperanto-kongreso. Multajn informojn pri Mongolujo vi povas trovi en Esperanto ĉe la TTT-ejo <http://mongolio.info>, kaj ankaŭ ligojn al informoj pri la kongreso. Por pliaj informoj, demandoj, ktp, ekzistas la retadreso [ak2010@esperanto.mn](mailto:ak2010@esperanto.mn).

Mi ĝojas kalkuli inter miaj amikoj kelkajn mongolojn, plejparte esperantistajn. Mi tre bedaŭras ke mi mem ne povos iri al Mongolujo ĉi-jare, sed mi deziras instigi laŭeble multajn esperantistojn partopreni en la kongreso. Ĝi certe estos sperto ne forgesebla, kaj se miaj amikoj estas ekzemplaj, la homoj tie estas tre amikindaj. Unu el miaj ekskolegoj el Japanujo ofte estas en Ulanbatoro ĉi-jare kaj lastjare por helpi pri la organizado de la kongreso.

—Joel BROZOVSKY

## Skribu al Usona Esperantisto!

Leteroj prefere estu ne pli ol 500 vortojn longaj; ni redaktos por laŭbezone koncizigi. Ni bonvenigas kontribuojn en Esperanto aŭ la angla. Skribante al la redakcio, nepre menciu ke vi proponas viajn komentojn por publikigo.

*Letters should be no longer than 500 words each; we'll edit for length as needed. Contributions may be in Esperanto or English. When writing to the editor, please be sure to indicate that your comments are intended for publication.*

## Ĉu partopreni en la 95a UK aŭ ne?

Kiel usona vojaĝ-agento, mi ne rajtas pagi por vi monon uzotan en nia granda, forta "malamiko", Kubo. Tamen, mi povus kaj certe rajtas doni al vi informon pri tiu ĉi grava por ni internacia konferenco:

- 1) Vi povas aliĝi pere de UEA – eĉ se vi persone ne povas iri – por subteni nian internacian movadon. Vi povas aliĝi per la reto, aŭ mi volonte sendos al vi paperan aliĝilon.
- 2) Vi devas posedi pasporton validan por almenaŭ 6 monatoj post alveno en la lando.
- 3) Niaj meksikaj kaj kanadaj amikoj provizos helpon partopreni kun ili en ne-usonaj flugoj, en antaŭ- kaj post-kongresoj kaj eĉ hotelo kiujn ili mendos por ni kiu ne rajtas mendi.
- 4) Ekzemple: "Survoje al UK" – Meksiko D.F. 3 noktoj
  - (a) Inter 7–10 julio, por tiuj kiuj partoprenos en ILEI aŭ antaŭkongreso, AŬ...
  - (b) Inter 14-17 julio, por iri al la komenco de la UK
- 5) Antaŭkongreso – Rondvojaĝe el Havano al Baracoa kie Kristoforo Kolumbo alteriĝis en 1492
- 6) Bela, komforta hotelo en Havano
- 7) Kolonia Cirklo de Meksiko DF al Guanajuato, San Miguel de Allende, Patzkuaro, Morelia, Toluca



### Lusi HARMON

Lusi estas vojaĝ-agento kaj la komisiito pri vojaĝ-aferoj por Esperanto-USA. Inter siaj propraj vojaĝoj, ŝi loĝas en Oakland, Kalifornio.

LusiHarmon@esperanto.org

Se vi volas havi detalojn pri iu parto de iliaj planoj, mi sendos al vi detalojn.

Vi devas kompreni ke E-USA petis permeson, kiel organizo, partopreni la UK-on, sed la burokratoj kiuj funkciis dum la periodo de la Bush-jaroj ankoraŭ laboras en tiu fako. Ĝis nun la Obama-administracio ne havis tempon aŭ emon atenti tiun malmoralan kaj tute eksmodan metodon protekti nin kontraŭ teroristoj. Se vi sekvis la aferojn dum la jaroj, vi scias ke miloj da usonanoj vojaĝos tien ĉiujare, kontraŭleĝe, por pli bona malmultekosta san-sistemo, por ĝui la muzikon, aŭ nur por bonege turismi. Nur la organizoj kiuj aranĝis la vojaĝojn suferis finance. Pro la fakto, ke mi kaj la plejparto de la mondo opinias ke la reguloj de nia registaro estas tute stultaj kaj malmoralaj, niaj samideanoj en Meksiko kaj Kanado volas helpi nin havigi sufiĉe da informo por decidi ĉu ni mem volas iri.

Se vi volas konsideri partoprenadon, sendu al mi per poŝto bonan kopion de la unuaj 2 paĝoj (kun via foto) de via pasporto – kaj peton pri informo. Tio tute ne signifas ke vi decidu iri aŭ ne. Eble vi nur volas scii, kion vi maltrafos.

Samideane via,

Lusi Harmon  
 Komisiito pri Vojaĝ-aferoj  
 2389 Thackeray Dr.  
 Oakland CA 94611  
 (510) 531-8393

## Metamorfozoj

Irlandaj legendoj estas konataj tra multaj partoj de la mondo, aparte tiuj fabeloj pri la koboldoj kiuj vestas sin verde, surhavas bulĉapelojn kaj gardas trezorojn ĉe la finoj de ĉielarkoj. Eble neniu krom mi vere kredas tiajn fe-rakontojn. Mi tute kredas ilin, tamen, ĉar unufoje mi transformiĝis en tian koboldon. Finfine, kvindek jarojn poste, mi nun povas malkaŝi la tutan veron.

En la somero de 1959, mi laboris po dek horojn nokte, po sep noktojn semajne, ĉe manufakturo kie ni produktis valvojn ŝtaltajn. La laboro estis malfacila kaj malpura, la vetero varmegis, kaj la fabriko varmiĝis eĉ pli pro forĝformoj. Aldone al nia mizero, ni bezonis porti pezajn verdajn uniformojn kaj veldistajn ĉapelojn kun mallongaj bekoj por gardi kontraŭ fajreroj kaj flamoj. Tiu okupo estis infera. La sola kialo por labori tiamaniere – malsimile al miaj kompatindaj kamaradoj – estis por amasigi sufiĉe da mono por reiri aŭtune al universitato.

Tiutempe nur du aferoj komfortigis mian vivon: mia belega karulino Ana, kaj mia maljuna ĉeĥa violono. Malfeliĉe, mi malofte povis viziti Anan – ankaŭ ŝi estis studento – ĉar ŝi laboris tage kiel kelnerino ĉe la kafejo *El Perro Roto*. Cetere, mi ne rajtis ludi la violonon kiam mi revenis de la fabriko je la tria horo matene; mi loĝis en luita ĉambro ĉe domo kie ĉiuj logantoj krom mi dormis nokte kaj laboris tage. Do, se mi volis malstreĉiĝi post mia labortago, mi veturigis mian kadukan aŭton en la kamparon kaj tie ludis la violonon sub la luno kaj steloj.

El ĉiuj lokoj en la kamparo, aparte plaĉis al mi la *Gazono de O'Bannon*. Ĝi estis



**Philip DeCAMP**

Phil ("Alko") loĝas en Novjerzeo kun sia edzino Gayle ("Ana"). *Metamorfozoj* estas lia dua rakonto por *Usona Esperantisto*.

**TwoDeCamps@comcast.net**

granda kaj bela areo, kiun la riĉa posedanto ne zorgis kultivi. Anstataŭe, tiu emerita irlandano tenis la landon plejparte por rajdi sur ĉevaloj kun sia filino. La tereno inkluzivis ankaŭ belan rojon, kiun la bienulo provizis per buntaj trutoj. La plej proksimaj domoj estis pli ol du kilometrojn for; sed malgraŭ tio, ludante spiritajn kamparajn melodiojn sur la rojobordo, mi alfiksis dampilon al la violono por kvietigi la sonon. Se la muziko sonus sufiĉe dampite kaj elfece, neniu ĝin aŭdus – aŭ almenaŭ tiel mi pensis...

Okazis je proksimume la kvara horo matene de la fatala tago, ke mi ludis ĵeton sub plena luno. Rigardante malatente en la akvon, mi vidis grandegan truton. Ĝi naĝis kontraŭ la fluo nur sufiĉe rapide por resti ĝuste antaŭ mi, kvazaŭ ĝi aŭskultis la muzikon. Nu, foje plaĉas al mi fiŝkapti, kaj ĉiu scias, ke fiŝistoj kaj violonistoj emas alianciĝi kun Diablo; do, kiam Diablo flustris en mian orelon, "*Kaptu la cielarkon – NEPRE!*" mi vere penis rezisti. Sed – ve – rezisto estis ja vana.

Rapide, kun ŝvitaj manoj, mi detranĉis longan arbobranĉon. Mi prenis unu kordon de mia violono kaj alfiksis ĝin al la branĉo por fari kaptilon. Klare, la diablo posedis min. Malrapide mi kliniĝis preter la krutan rojobordon kaj mallevis la kaptilon en la akvon. Eĉ pli malrapide mi tiris la kaptilon apud la voston de la fiŝo. Fine,



kun kaptilo en la ĝusta pozicio, mi *atakis!* La kordo streĉiĝis, la fiŝo impetis, mi perdis egalpezon kaj transkapiĝis en la rojon, skrapante la verdan muskon de la bordo per mia vizaĝo. Tamen mi surteriĝis sur la piedoj kaj eksciis, ke kvankam mi staris en akvo ĝiskokse, la kordo restis streĉita kaj mi *ankoraŭ tenis la fiŝon*. Kiam la truto saltis en la aeron, mi ĝojkriis leone!

Je la sama momento, grandega ekbrilo preskaŭ blindigis min – mi vidis antaŭ mi nur verdajn makulojn. Ektirante la manojn al la vizaĝo, mi lasis fali kaj kaptilon kaj fiŝon. Dum mi klopodis vidi denove, mi aŭdis sonon de iu, kiu forkuris de la alia roĵobordo. Sendube la ekbrilon kaŭzis fulmlumilo de fotilo.

Negrave, la fiŝo eskapis. Pli grave, mi perdis kordon de mia violono. Tre grave, mi agis stulte – kaj dume, iu fotis min. Mirinde! Malseka, laca, kota, malsata kaj humila, mi reiris al mia ĉambro. Kiam finfine mi ekdormis, mi sonĝis pri Diabolo ridanta.

Ĉirkaŭ tagmeze, mi vekigis. Ĉar mi ne volis pripensi mian malsaĝaĵon, mi okupis min per aĉeto kaj zorgema instalado de nova kordo por la violono. Survoje al mia laborejo, mi haltis ĉe *El Perro Roto* por trinki kafon kaj babilu kun Ana. Post la foriro de la tagmezaj homamasoj kaj antaŭ la vespermanĝa horo, Juan, la propulo, ne ĝeniĝis se Ana kaj mi babilis iomete. Li estis vidvo, kaj plejparte li nur palpebrumis kaj forturnis la kapon kiam mi envenis. Tiun tagon, kiam mi sidiĝis ĉe la verŝtabulo, Ana rapide alportis al mi kafon kaj ŝi aspektis tre ekscitita.

Ŝi fingre montris la televidilon sur la muro kaj diris rapide, “Ĉu vi jam vidis

tion? Ĝi estas la granda rakonto de la tago. Vidu!”

Raportisto sidis apud kampulo kaj paroladis: “...jen Jimbobo Ruĝakolo, kiu venis al nia stacio matene kaj asertis, ke li havas fotan pruvon ke la rakontoj pri preternaturaĵoj en Kantono Klermonta estas veraj. Kia surprizo kiam ni rivelis la filmon! Vi juĝu! Ĉu tio estas koboldo fiŝkaptanta?”

Mi malmulte aŭdis la raportiston post kiam la foto aperis surekrane, ĉar tie estis mi: staranta en akvo, vestata en verdo, kun musko sur la vizaĝo en la formo de verda barbo. La beko de mia ĉapeleto aspektis kvazaŭ rando de bulĉapelo, kaj mi ŝajne levis la grandan truton per magia vergo. (La violonkordo restis nevidebla en la foto, sed aperis ekbrilo ĉe la fino de la branĉo kie la kordo reflektis la fulmlumilon de la fotilo. Klare, tio estis *magio!*)

“...sekvis la stranga muziko...” diris Jimbobo, “...kaj tiu ululo! Mia sango glaciigis!”

“Kion vi pensas?” Ana demandis.

“Ĉu vi ne vidas?” mi flustris. “Tio estas mi!”

Grandokule Ana rigardis jen min, jen la televidilon, denove min, denove la televidilon. Ŝi ekbalbutis ko-vortojn: “Kia... k-kiel... k-kio...” kaj fine, “KIAL?”

“Ŝŝŝ! Mi klarigos”, mi respondis, tute malcerte. Mallaŭte kaj tre rapide, mi rakontis la tutan aferon – krom la parto pri Diabolo – dum ŝi aŭskultis min kun buŝo malfermita.

Fine, Ana skuis la kapon kaj ree demandis, “Sed kial?”

“Ĉu vi kredas je ‘frenezaj momenta?’”

“Jes,” ŝi diris, “vi estas sendube freneza, sed mi ne scias pri ‘momenta’.” Ŝi ridis kaj skuis la kapon denove. “Grave – vi devas

konfesi. Kelkaj kampuloj estas tre superstiĉaj. Vi kaŭzos grandan timon inter tiuj se...”

Mi pensis rapide kaj interrompis ŝin. “Mi scias – *SED...*” Mi spiris profunde kaj diris, “Se mi konfesus, povus sekvi du eventualoj: unue, la kampuloj venus por ĉasi min kun torĉoj, falĉiloj kaj fojnoforkoj – same kiel ili postkuris Frankenstein-on. Due, oni min alportus al La Honorinda Juĝisto, kiu estas bienulo en Kantono Klermonta kaj arda sportisto. Ho! Tridek tagojn li malliberigus min pro fiŝkaptado sen permesilo; sesdek pro fiŝkaptado per kaptilo; tridek pro transpaŝo kontraŭleĝa; tridek pli ĉar li opinias min turpa montarano, kaj tiel plu... Mi restus en malliberejo ĝis Kristnasko. Ambaŭ ebloj ne plaĉas al mi. Mi esperas, ke ni tenu ĉi tiun informon kiel nian sekreteton.”

Ana iom kuntiris la brovojn iom, paŭzis, kaj fine tuŝis la randon de mia taso per fingropinto. “Certe vi scias, Alko, ke oni ne povas devigi edzinon denunci la edzon.”


Ne dezirante tremi, mi levis la tason al mia buŝo per du manoj, kaj kisis la fingropinton. “Mi timis, kara, ke vi neniam demandus.”

Ŝi ridetis alloge. “Nu-u-u, kiom ofte venas al knabino oportuno edziniĝi al freneza koboldo?”

La rakontoj el Kantono Klermonta fariĝis pli absurdaj tagon post tago: porkoj flugis nokte, anasoj parolis tage, hundoj predikis evangelion dimanĉe. En la aŭtuno, Ana kaj mi tre feliĉe foriris de kaj urbo kaj kantono por reveni al la universitato. La sorto ne permesis nin reveni al la kantono dum kvindek jaroj, sed antaŭ kelkaj monatoj ni reiris kaj konstatis, ke la

sola rikoltaĵo tie estas domoj. Ĉie estas domoj. Eĉ la roĝo kie mi antaŭlonge ludis violonon – ĝi nun fluas tra betona tubo subtera, sub domoj. Mi desapontiĝis, sed mi scias, ke aferoj ofte ŝanĝiĝas; kaj kvankam kelkaj ŝanĝoj efemeraj, aliaj – ekzemple miaj metamorfozoj – daŭras. Eĉ nuntempe, mi kelkfoje songas kampulojn kun falĉiloj kaj torĉoj. Cetero, kiam mi razas min, mi kelkfoje vidas koboldon en la spegulo, kaj aŭdas ridon de Diabolo.

Kaj ĉiam – ĉiam – mi gardas la trezoron konfiditan al mi antaŭ longa tempo. ★



## Senintenca esperantaĵo?



Ĉu sapujoj pensigas reklamistojn pri Esperanto? Unue venis *SANIS* kaj poste *ĜOJO* (vd. N<sup>o</sup> 2008/3). Kaj nun, jen alia! “Psst! Hej, vi! Ĉu vi volas preni mian sapon? Nu, faru *PROVON...*”

Ĉi-numere por la rubriko ni havas denove elrusigitan poemon de Jaroslav KROLUPPER en Ĉeĥujo, kaj unu poemon tradukitan el la hebrea lingvo fare de Ŝajo MOR en Kanado. Dankon al ambaŭ, kaj mi atendas de ili pli da tradukaĵoj! —Red.

## אין לי ארץ אחרת *Mi ne havus alian landon*

Verkis Ehud MANOR  
Elhebregis Ŝajo MOR

Mi ne havus alian landon  
eĉ se mia tero bruliĝus.  
Nur hebrea vorto penetras  
tra korarteriojn  
al mia animo.

Kun dolora korpo –  
kun malsata koro  
ĉi tie estas mia hejmo.

Mi ne silentos,  
ĉar mia lando ŝanĝis sian vizaĝon.  
Mi ne rezignos ŝin  
Mi memorigos ŝin  
kaj mi kantos en ŝiajn orelojn,  
ĝis ŝi malfermos siajn okulojn.

Mi ne havas alian landon  
ĝis ŝi renovigos siajn analogojn  
ĝis ŝi malfermos siajn okulojn.

Ehud MANOR  
(1941–2005) estis  
fama israela kant-  
verkisto, tradukisto,  
kaj konata pro sia  
laboro en televido  
kaj radio.

Pri la fono de la  
kanto, Ŝajo skribas:



Israela poŝtmarko  
omaĝe al Ehud MANOR

*Ĝi estas ofte dissendata per multaj radiostacioj ĝuste sekve de krizeventoj. Tial ŝajnas al mi ke, en la animo de multaj el miaj (eks)patrujanoj, tiu, ĉefe la unua strofo, povas esti kvazaŭ neoficiala himno, uzata por rekonfirmi nian ununuran apartenecon al nia lando-socio-ŝtato."*

